

# BIBLIOGRAFIA GAZETO

Redakcio kaj administracio  
Hungarujo, Budapeŝt, IX.,  
Mester ucca 53, V. 7. —  
Telefonnumero: 380—84

REDAKTAS:  
K. KALOCSAY

Senpaga por abonantoj al  
Literatura Mondo kaj anoj  
de AELA. — Aparta abono  
1.80 svisaj frankoj por jaro

## *Galaj konsiloj al juna ekrecenzisto*

Kara kolego,

intencante eldoni kaj redakti novan esp-an gazeton sub titolo »Verda Purigilo«, kiu titolo jam per si mem perfidas, kiom vi rekonis la gravecon de l' kritiko, vi turnis vin al mi por konsiloj. Mi rapidas sciigi vin pri mia konsildonemo. Jen:

Via unua kaj fundamenta ĉefprincipo estu: *la faktoj neniam kaj neniel ĝenu vin*. En la konsienca sekvado de ĉi tiu regulo kaŝiĝas la sekreto de sukcesoj en nia »dura« metio. Por plifaciligi vian taskon, mi ilustras ĝin per kelkaj ekzemploj. Ja estas pli lume ol la suno, ke per atakoj vi plej facile altiros la atenton de la legantoj. Sed kion fari — vi demandos — se en la recenzata libro vi ne trovos vundeblajn kalkanojn? Nu, ne estu tiel anĝele naiva: ataku tiajn ideojn, asertojn, kiajn la libro tute ne havas, nur ŝajnu, ke ili estas proprajoj de l' aŭtoro. La afero estas tre simpla: ekzemple la aŭtoro estis tiel aŭdaca... hop! pardonu, mi forgesis pri la buŝkorbo, pli ĝuste plumkorbo, per kiu ĉiu bone edukita neologismemulo estas nuntempe ekipita, do ni uzu kuraĝega — do se la aŭtoro estis tiel kuraĝega, ke li tuŝis al unu el la vesponestoj de nia verda ĝangalo, ekzemple al la problemo de l' elparolo kaj li asertis, ke li trovas sufiĉe plaĉa kaj multe uzata la longan kaj malfermitan prononcon de tiuj vokaloj, kiuj estas akcentitaj kaj kiujn sekvas ununura konsonanto, tiam kriiu, ke laŭ la aŭtoro »vitron« oni elparolas »viitro«. Ĉiu leganto scias, ke tia elparolo estas malĝusta, do vi kredigis, ke la aŭtoro estas azeno, krome por vi mem vi malmultekoste akiris la famon de saĝulo.

Entute neniam forlasu la okazon akcenti vian prudenton kaj la multajn kulturojn, kiuj profunde influis vin. Nepre raportu pri la spertoj, kiujn vi akiris proprapersono, ekzemple en la necesejoj de kvin kontinentoj... Sed tuj grumblu pri »snobismo«, se la aŭtoro



aludis ion konatan al la plejmulto de eŭropanoj, en tia kazo via protesto sonu en la nomo de l' orientanoj (kompreneble tute ne gravas, ke la orientanoj komisiu vin per la reprezentado de siaj intereso, iom post iom vi kutimigos ilin, ke ili rigardu vin sia advokato).

Se temas pri libro de nova aŭtoro, ne forrestu kelkaj patrecaj ŝultrofrapadoj. En recenzo pri tia libro ne forgesu almenaŭ dekdufoje menciŭ la junecon de l' aŭtoro. Ne gravas, ke li eble jam portas belan, longan, arĝentan barbon, la leganto ja ne distingos inter »noveco« kaj »juneco«. Juneco ja asociigas »verdbekecon«, do en la okuloj de la leganto la pezo de l' aŭtoro malpliigas, sekve la via pliigas, ĉar kiom vi prenas de la verkisto, tiom vi gajnas, laŭ leĝo de la recenz-fiziko...

Vian foton aperigu laŭeble en ĉiu numero de l' gazeto, ne malutilas eĉ po 2—3 fotoj en ĉiu numero. La fotoj prezentu vin en la plej diversaj pozicioj, unu el ili nepre eternigu la momenton, kiam vi verkas viajn recenzojn en via ĉambro ornamita per orienta lukso. Por tia foto necesas monaĥe transspiritiginta vizaĝo, kiu je la unua vido atestas vian profundan mediton, tamen ne manku energiaj trajtoj, por certigi la rigardanton pri la severo kaj senindulgo de via kritiko.

Urĝe aliĝu al la vetĉasado kontraŭ neologismoj kaj neologismemuloj. Tio estas nun modo kaj tre profitdona. Sur tiu ĉi vojo vi akiros plej rapide la titolon de »senriproĉa kavaliro de pure zamenhofa lingvo«, aŭ tiun de »Purigisto«. Ĉar la esp-an literaturon ŝajnigu ia grandioza malpurejo, kiu atendis nur vin kaj viajn purigilojn... Ke vi mem uzas neologismojn, ne gravas, nur atentu, ke en viaj artikoloj kontraŭneologismaj neniam uzu argumentojn! (Ilin oni ja povus refuti!) Viaj frazoj estu rekte simplaj kaj firme deklaraj, kaj la leganto kredos vin! Sed se la neologismemuloj argumentos, ilin simple prisentu kaj daŭrigu papage viajn asertajn frazojn, kredu min, ke la oreloj de la legantoj plifacile kutimigos al ili, ol ilia menso al cerbumado pri la argumentoj de viaj kontraŭuloj!

Nu, mi pensas, ke sufiĉas por ĉi tiu fojo. Kredu min, ke miaj konsiloj ne estas teoriaĵoj de ĉambro, ili prezentas esencon zorge filtritan el la praktiko de nia kritika literaturo. Kompreneble se vi jam bone enekzercis vin en ĉi tiujn regulojn, mi povas servi vin ankoraŭ per kelkaj interesaj kaj spritaj subvariantoj, per kiuj surprizis nin niaj kritikistoj — tiom diferencaj je temperamento kaj individuaj inklinoj. Kaj se vi volas mem iĝi verkisto, do recenzoto, ankaŭ por tiu kazo ne forrestos miaj konsiloj.

Kolege via *Ludoviko Tranĉe*



## Revuo de Revuoj

*Ligito* de la esperantistoj en Bydgoszcz: Vigla, bonhumora loka gazetato.

En *L' Esperanto* aperis la kvina kaj sesa kantoj de la Infero de Dante tradukita de Kalocsay.

Nova porjunulara gazeto aperis sub titolo: *Juna Esperantisto*. Ĝia enhavo konsistas preskaŭ ekskluzive el oficialaĵoj, raportoj k. t. p.

En *Kataluna Esperantisto* mi legis detalan raporton pri la XIV-aj Floraj Ludoj.

En *Suda Stelo* mi legis: »Tio estas nekontestebla kaj tute komprenebla fakto por ĉiu tiu, kiu...« Ĉu ne bele?

*Lingvo* estas la titolo de la nove aperinta monata propagandfolieto de la meksikia Esperanto-movado. Ĝi aspektas tre primitive.

*Scienca Gazeto*: popularsciencia dumonata revueto.

En *The British Esperantist* aperis de s-ro Butler valora recenzo pri la Parnasa Gvidlibro. Multajn liajn asertojn mi trovas eraraj, aliajn pripensindaj, sed estas evidente ke lia objektiva tono efikas agrable post lego de samtemaj pamfletaĵoj.

*Hungara Heroldo*: El literatura vidpunkto nenio interesa. En ĝi mi legis: »Kaj vere, estus konsilinde, se la redaktejo de Literatura Mondo pli zorgeme sin tenus ĉe la enkonduko de neologismoj.« La konsilon mi transdonis al la loĝejo de la redakcio.

La literatura rubriko de *Esperanto* (UEA) plivigliĝas. En la decembra numero mi trovis miniaturan ĉefverkon de Mih. Soŝtenko: La lerta polica hundo (trad. Minuška Mantel). Ĝi estas bubhumore petola miksaĵo el ironio kaj sprito. — Edmond Privat esperantigis legindan legendon hindan sub titolo: Amo de Virino. — Stranga, sed ne enua groteskaĵo estas la artikolo de Carl Georg von Maassen: Manĝkunulo Morto. El ĝi jen cito de verso de Richard Roos, dresdena poeto (la nomon de l' tradukinto mi vane serĉis):

### Manĝemula Epitafo.

Li celis, ke nur multe  
Li manĝu kaj bonguste,  
Nun li mem ĉe la celo  
De l' granda viv-vojaĝo  
Estas manĝaĵo verma.

Novan rubrikon mi trovas sub titolo: Tra la gazetaro. Ĝi observas precipe el la vidpunkto de l' organiza demando. La rubriko (kaj, ĉar ĝi ne estas subskribita, ĉu ankaŭ la redakcio?) alprenis sintenon malamikan al la neologismoj. Tiu ĉi sinteno ĉe la elekto de la citaĵoj naskas kelkajn teknikajn ŝongladojn, sed ĉu estas mirinde dum la nuntempa modo? Kvankam ĉe tia serioza revuo... — La angla humoraĵo: »Stokholmo bombardata de eskimoj.« (trad. Tib. Morariu) estas amuza satiro pri nuntempa internacia politiko. — Sub titolo: »Dormo anstataŭ sinmortigo« mi legis interesan artikolon el la temaro de l' psikanalizo. — La Stroele-recenzo pri la Parnasa Gvidlibro pruvas, ke ankaŭ kontraŭneologismo kapablas uzi objektivan tonon, se li estas konsciencia homo kaj ne pamfletisto.

*La Esperantisto*: Fine japana gazeto, kiu estas tute esp-lingve eldonata. Papero, preso bonaj, preseraroj apenaŭ. La enhavo laŭteme kaj laŭnivele



tre diversvalora. — Interesa, kvankam iom troskizeca kaj nesufiĉe profundira estas la artikolo de F. Kišimoto: Novaj fazoj en japana literaturo. — S-roj T. Sasaki kaj J. Iŭaŝita, de Studejo de Zamenhofa Gramatiko, verkas artikolserion tre seriozan pri: De post, Depost aŭ Ekde. — Japanajn naturbelecojn kaj historiaĵojn konigas la artikolo: La enlanda maro en poezio kaj tradicio.

Kaj fine ni raportu pri grava kaj en nia gazetaro unika nova revuo, pri la *Politika Sociala Revuo*. Ĝi intencas publikigi studojn pri problemoj de l' socia vivo, ampleksantaj la historion, geografion, ekonomion, politikon, religian kaj moran kritikon. Por garantiu la kvaliton de l' materialo ĝi aperigas nur tradukojn de artikoloj aperintaj en bonaj nacilingvaj revuoj. Pri la elekto kaj lingvo de l' tradukoj garantias la nomaro de la gvidkomitato: Bernard Lavergne, profesoro ĉe la universitato de Lille, Fritz Kern, profesoro ĉe la universitato de Bonn, W. E. Collinson, profesoro ĉe la universitato de Liverpool, Louis Bastien generalo intendanto, Gaston Waringhien, profesoro ĉe la liceo de Lille. — La unua numero alportas nekrologon de Ch. Rist pri Charles Gide, kaj Gide-artikolon titolitan: La respublikoj de la jezuitoj en Paragvajo. Ĝi estas konciza, kernpalpa raporto pri tiu ĉi tre interesa eksperimento, pritraktita el la vidpunkto de l' politika, ekonomia, socia vivo, kaj neniam en la seka lingvo de fakulo, kelkfoje la lingvo de Gide estas poete vizia. — Ankaŭ la artikolo de D-ro P. Jakob pri la »Efikoj de la ekonomia krizo sur la spirita vivo en Germanujo.« estas interesa kaj pro sia aktualeco certe vaste legota. — Eta ĉefverko estas la artikolo de A. Siegfried: »La franca karaktero vidalvide al la moderna mondo.« Neniam mi legis tiel spritan kaj esencontrafantan studon pri ĉi tiu temo. Ĉiu scias, kiel gravan rolon ludas la franca politiko en la nuntempa Eŭropo, sed tiu ĉi politiko estas bazita sur la karaktero de l' popolo. La lego de la Siegfried-artikolo multe helpas la orientiĝon en la nuna haoso. Por ioma gustumo servu jena cito: »La plej franca el ĉiuj proverboj estas sendube tiu ĉi: »Mia glaso ne estas granda, sed el mia glaso mi trinkas.« Fine ni trovas recenzan parton pri kies kvalito certigas la nomo de l' recenzanto: Waringhien. — La unua numero prezentas bonegan komencon, sed estonte la redakcio devus pli zorge eviti preserarojn, kiuj iom troabundas. — La *Politika Sociala Revuo* meritas plenan atenton de la parto de l' esp-ista intelektularo, por kiu ĝi signifas denovan tergajnon en nia movado. *Ludoviko Totsche.*

## R e c e n z o

HUNGARA ANTOLOGIO. La unua libro de AELA. Redaktis: K. Kalocsay. Kunlaboris: J. Baghy, K. Bodó, L. Halka, F. Szilágyi, L. Totsche. Enkondukon verkis Miĥaelo Babits. Poemoj kaj noveloj de 50 hungaraj verkistoj. Eldonis Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj, Budapeŝt, IX, Mester-u. 53. Formato 15×23 cm. 472 tekstopaĝoj kaj 24 klišopaĝoj kun la fotoj de 47 verkistoj. Senligna papero, multkolora kovrilo. Prezo: sv. fr. 12.— broŝ.; sv. fr. 14.— bind., 10% por sendkostoj. Por anoj de AELA la unua libro el la ses, kiun ili ricevas por sia kotizo de 13.50 respektive 17.— frankoj svisaj.

Evento rapide sekvas eventon en nia epoko de l' kulturo de Esperanto.



Venas verko post verko de Kalocsay, Baghy, Schwartz kaj Engholm. Pasis nemultaj jaroj de post la aperigo de l' kompleta Biblio en Esperanto. Gravega aldono estis la verko historia, *Jarmiloj Pasis*. Notinda en lasta jaro estis la apero de l' unua kritika verko en Esperanto pri ĝiaj elstarantaj literatoj. Kaj la jena granda volumo estas ankoraŭ evento, kiu prezentas gravan novan etapon en la kresko de l' kulturo de Esperanto al faktoro tutmonde grava.

Mi estas invitita sufiĉe subjektive skribi miajn impresojn pri la verko, sed la inviton mi nur parte akceptas, ĉar ankaŭ el sufiĉe supertera vidpunkto mi volas paroli. Unue, tamen mi parolu pri la verko el vidpunkto de iu, kiu neformale sed sufiĉe funde estas trempita en tiu okcidenta literatura kulturo, de kiu la jena verko ŝajnas esti sintezo. Efektive, ĝuste tial mi estas ravita de la volumo, ke, preterlasinte dum kelka tempo la belliteraturon kiel eron de la ĉiutaga vivo, mi retrovas en la unua libro de AELA sintezon de tuta mia legado el literaturoj de pluraj landoj en lingvoj angla, franca kaj internacia, per kio mi konatiĝis kun la menso de la Predikanto, de Petronius, de Montaigne, de Rousseau, kaj de aliaj superaj mensoj ĝis la epoko de André Gide kaj Thomas Mann.

En la lasta tempo, dediĉante min al kunesto kun ĝeamikaro, al politika laboro en la Esperanto-movado, aŭ al iom da laboro por la socialisma skolo, trovante feliĉon en tiaj okupoj, mi plurfoje demandis min ĝenerale pri la belliteraturo: »Al kiu ĝi estas helpo, por kio ĝi havas valoron?« Se mi konfesas, ke tiel mi dubis pri la valoro de l' belliteraturo, kaj se mi konfesas, ke por mi tiu ĉi antologio de hungara literaturo estas plena respondo, mi laŭ mia eblo plej forte esprimas mian laŭdon pri ĝi. Ŝajnas, ke funde mi konsentas kun la eldiro de Totsche en la lasta numero de Bibliografia Gazeto, kvankam mi eble flankajn punktojn volus disputi ankoraŭ: »(Oni) konfesu la *esencon* sendependon de l' Arto de historiaj, geografiaj, rasaj kaj klasaj faktoroj, oni rekonu, ke provizore povas ĝin makuli influoj, tendencoj, sed li vidu klare, ke ili restas nur surfacaj, ke la sentempan, internan substancon ili ne povas infekti: oni konfesu, ke la Arto supervivos krizojn, kataklismojn, dum sola homo vivos sur la Tero.« Jes, tiel mi sentas, kiom ajn mi kredas al la nuna Triunuo, Darwin, Marx kaj Freud, kiom ajn mia intelekto kontraŭargumentas mian senton. Kaj se, post nia aserto, ke la arto ebligas al ni vivi pli larĝe kaj pli intense, kaj plilarĝigi kaj pliintensigi la vivon de niaj ĝeamikoj, se post tia aserto nia oni demandas al ni kial, por kio entute ni vivas, ni povas trankvile respondi, ke ni ne scias.

Forpasi post ĉi papilia vivo,  
Foriri, nesciante: kien nun?  
Kaj neniĝi eble poreterne,  
Ne vidi plu la brilon de la sun'!

Ho, hom' pasema, reĝ' aŭ almozulo  
La kapon levu, tenu, alten ĝin,  
Heroo estas, kiu porti povas  
La penson de la morto en la sin'!

Tiel iu János Vajda, mortinta hungaro vivonta en traduko de Kalocsay. Tiel skribinte, mi ririgardas la libron kaj mian notaron sur ĝiaj paĝoj, kaj mi trovas multe da eta kritiko, kelkloke mi havis la impreson ke ŝajne mia amikaro de Budapeŝt montris tro unuflankan vidpunkton en sia elekto, nesufiĉe atentis priskribojn pri milito kaj malriĉo, troe dediĉis atenton al erota literaturo, ekzemple. Sed post la plena ellego klare montriĝas, ke ne tiel estas. Certe ŝajnas, ke kelkaj prozaj pecoj, ekzemple de Mór Jókai, aŭ de Géza Gárdonyi, estas iom banalaj; kaj mi volus demandi, ĉu la



hungara literaturo ne donas al ni satiron krudan, en speco de Voltaire, aŭ eseiston en speco de Montaigne aŭ Hazlitt? Generale, tamen, mi trovas en la volumo, laŭ eblo de ĝia amplekso, sintezon tre multflankan laŭ temaro, laŭ orientiĝo al la vivo en ĉiuj ĝiaj facetoj, laŭ verkmanieroj: literaturan sintezon de ĉiuj miaj beletraj legadoj de post puberta aĝo faritan de veraj literatoj sub la gvido de K. Kalocsay.

Jen, la subjektiva recenzo, ke tion kaj tiel trovas mi, kiu jam de l' apero de verkoj hungaraj en la serio de Mosse, en majstra traduko de Bodó, konstatis, ke la hungara literaturo moderna estas same matura, same delikata, kiel la moderna angla aŭ franca literaturo, mi, kiu jam frue en sia legado en Esperanto trovis tiun universalan kaj grandiozan verkon de la hungara literaturo, *La Tragedion de l' Homo*. Kaj antaŭ ol kritiki el iom pli vasta vidpunkto ol la mia ĉi tiun antologion, mi permesu al mi noti kelke da eroj speciale plaĉaj al mi persone.

La komencan paĝaron mi rapide turnas, por mi la popolaj baladoj ne estas interesaj; sed mi ne preterlasu gratuli, ke la verko montras lertan kombinon de historia kaj aktuala intereso — kaj ke la vorton «aktuala» mi ne uzas en surfaca, nurdistra senco, tion mi poste montros. Baldaŭ mi trovas poemon de Mihály Vörösmarty, *Pensoj en Biblioteko*, majstra filozofia versaro. Poste mi trovas la mondfaman nomon de Sándor Petőfi: el la multaj poemoj plej plaĉas al mi *Ja neniam amis kiu diras, Ho Teda Pens'*, *Valo kaj Monto* kaj *Kial kantas Vi, Poetoj Bonaj?* De Géza Szilágyi, frua reprezentanto de l' dekadencan franca liriko, venas interesa peco, *Dorsoj*. Por Endre Ady mi ne trovas en mi la entuziasmon kiun laŭ ĝenerala juĝo li meritas, sed *Batalo kun la Grandsinjoro* interesas. La nomo Mihály Babits elvokas karajn memorojn, jen oni trovas represita *La Danaidinoj*. Ankaŭ notindaj por mi estas *Strato Antaŭtagmeze* kaj *Strato Vesperiĝe*, sed speciale mi estas ravita de *Delonge Forsonoris Temp' de Sappho*: se la lirika poezio bezonas defendon en la mondo de 1933 — kaj mi kore kunsentas iun, kiu sentas ke tion ĝi bezonas — jen estas la plejble inda respondo. *La Rideto* de Ernő Szép estas rimarkinda. Kaj jam multfoje en la lastaj tagoj kun eta ekstazo mi legis al amikoj la poemeton de Oszkár Gellért, *La Nokto de Libertempa Soldato*. Estinte metiisto jam de aĝo dek-kvar, kiu ankoraŭ per fingre kaj dungate laboras, mi aprezas la poemon *Metiistoj* de Lajos Kassák.

Nun mi jam venas al la proza parto, kaj devas ekkoncizi. Plaĉas en sia speco preskaŭ ĉiuj noveloj, nur kelkaj banalas. *Ce la Arbara Rando* amuze prezentas vidpunkton Gide-ecan pri la temo sinmortiĝo. *Rakonto pri la Fratinoj Tündérlaki* estas akra kritiko pri seksmoralo. Pri la *Mitologio* de Mihály Babits, en traduko de Totsche, mi malfacile bridas la entuziasmon, ĝi faras ian gigantecan efikon kiu iel memorigas min pri James Joyce. La tria kaj kvina ĉapitroj speciale impresas min. Novelo de Zsigmond Móricz prezentas en ŝatinda realeco kiel nature povas la militinto malriĉa murdi ankaŭ en civila vivo. Bodó en sia traduko de novelo de Dezső Szomory montras denove genian talenton en la traduka arto. Tamen mi devas jam fini la komentojn, ĉar, kvankam mi studis la volumon de kovrilo al kovrilo, mi ankoraŭ ne plene elminis la tutan gemaron literaturan kaj lingvan. La kunlaborantoj por tiu ĉi antologio pruvis sian veran fervoron por la hungara literaturo, dedikante sin al tia traduka laboro, kiu estas tiom pli malfacila, kaj bedaŭrinde ofte malpli alte taksata en nia kulturo, ol la originala verkado: ili aldonis al la kulturo



de Esperanto riĉaĵojn, por kiu la legantoj nepre devas senti sin apenaŭ kapablaj sufiĉe danki. Ni, legantoj, relative estas malmultaj — la literatoj de Esperanto nur estonte trovos popolon nombre laŭ sia merito — sed ni devas laŭeble subteni per aprezo kaj aĉeto. Samtempe ni rajtas memori, ke kiu aprezas kaj aĉetas, tiu ankaŭ siamaniere kreas kaj laboras.

K. R. C. Sturmer.

UNIVERSALA ESPERANTO METODO DE BENSON. Kia kurioza verko! Ĝi tre interesas min el psikologia kaj ideologia vidpunkto. El la bildaj difinoj, lertaj kaj kelkfoje amuzaj, la aŭtoro kvazaŭ vive aperas antaŭ la okuloj. Li evidente estas rezulto de severa puritana eduko etburĝa de l' lasta jarcento, sur kiu estas konstruita surfaca »liberpensemo«, racionalismo de malaktuala speco. Spite tion, ke li evidente konas almenaŭ la nomojn de Freud, Eddington kaj Trocki, li tamen mense vivas en epoko antaŭa, kaj iliaj influoj ne penetris sub lian haŭton.

La verkego, kiu estas malaktuala ankaŭ laŭ aspekto de sia presliteraro, plaĉos al certa tipo de menso tre disvastigita en la »neŭtrala« movado, al menso kiu konstante taksas Esperanton kiel ludilon en si mem, menso kiu estas trovebla ĉe la plejmulto el tiuj etburĝaj konstantaj lernantoj, kiuj daŭre subtenas per kotizoj kaj ĉeesto la asociojn kaj kursojn de la »neŭtrala« movado. La volumo havos por tiaj tipoj tiun sorĉan intereson, kiun iu enciklopedio Pears havis por mi kiam mi estis knabo. Sed kiom multe da homa energio estas por ĝi malŝparita!

Tamen mi honeste konfesu ke multaj el ĝiaj bildaj difinoj tre amuzis min, kaj ke mi lernis multajn vortojn por mi novajn, ekzemple *prognozo*, *inveno*, *esbonito*, *kelbo*, kaj *pastinako*.

Lasta punkto interesa: per siaj difinoj de l' vortoj *evident*, *kondut*, *ekzempl*, *pun* kaj *bat*, kaj per bildoj de paĝoj 49, 53, 61 kaj aliaj, la aŭtoro montris kiom multe li estas viktimo de certa mensa tordetiĝo kiu (espereble) forpasis en la nuna generacio por ĉiam. Al homo edukita en postmilita angla aŭ usona vivo tia tordetiĝo devas ŝajni sufiĉe fremda.

K. R. C. S.

DOMO DE HOMAMO. Eldono de Oomoto Internacia, 1, rue Félix Faure, Paris 15e, Francujo. 14. paĝa multobligita kajero. Prezo ne mont-rita.

La subtitolo diras, ke ĝi estas »la plej grandioza entrepreno en Esperantujo«. La ideo vere estas bela. La Universala Homama Asocio fondita de la japana religi-filozofia movado Oomoto, »celas interfratiĝon de ĉiuj homoj sur la tero« kaj »krei bazojn de la Homaranismo«. Tia bazo estu la Domo de Homamo, kiu pruvu, ke »la unuigo de la homaro estas ebla.« Ĝi estu sidejo de la »Ligo de Homoj«, oficiala lingvo estu Esperanto. Oni bezonas 25 milionojn da francaj frankoj, laŭ statistiko de la kajero ĝis nun pagis 312 personoj sume: 13,315.— frankojn. Ĉapitroj priskribas la aranĝon de la domo kaj planon pri konstruo. Kelkaj eraroj eble ne gravas en tia kajereto.

P. B.

BES-A ADRESARO DE ESPERANTISTOJEL CIUJ LANDOJ. 10-a eldono. 1932. prezo 1.— fsv. Eldono de BES, Potštejn, ĈSR. La 116 paĝa poŝformata libreto kun 1107 adresoj el ĉiuj kontinentoj povas esti grava praktika helpilo al la korespondema kaj intersanĝanta esperantistaro — kondiĉe, ke la personoj vere respondas. La fotetoj de pli, ol cent per-



sonoj ebligas tuj antaŭe vidi, kun kiu oni ekkorespondos. La jubilea eldono pravas, ke ĝi estas ŝatata kaj rekomendebla al interesigantoj. P. B.

ESPERANTLINGVA NOVELBIBLIOTEKO. Eldonejo: N. Szapiro, Warszawa. 20×13.5 cm. ĉiu numero 0.40 sv. fr. N-o. 4.

L. Biró: Fraŭlino Ida. K. Porzolt: La vojo malsupren. El la hungara: L. Rereips. 26 paĝoj.

La unua estas senpretende, sed ne sensatire rakontita historio, cetere sufiĉe banala. Ĝia esp-igo ne estas tre motivita. La dua atestas pri kruele akra observkapablo, pri preciza kono de homaj malfortajtoj, pri facila, sed surfacema ekkapto de serioza problemo, pri tem-ellaboro malperfekta, pretere rapida. Entute ĝi estas ne seninteresa varianta de populara temo: la efiko de l' mizero je junaj geedzoj. Iom mirigas, ke en la serio la tiel riĉan hungaran novelliteraturon reprezentas ĝuste tiuj ĉi noveloj. La tradukinto konstante solvas sian nemalfacilan taskon.

N-o 5. *Hermano Bang*: La hontemulo. La unua kiso. Tradukis: Leono Vienano. 32 paĝoj.

Stranga estas ĉi tiu historio de la granda dana impresionisto kaj animesploranto pri la tragika vivo de la malfeliĉa bela Francisko. Post eliego oni demetas la libreton kun ia laca, prema sento, kiu jam preskaŭ malagrablus. Kaj tamen oni admiras la brilajn etajn bildojn, la miniaturhumorojn de ĉi tiu »poentilista« artisto, kaj la grandiozece de l' ferma bildo (la pugnigita mano de Joanno levita al la ĉielo) fiksiĝas forte en la memoro. — La unua kiso: valorajo de stilo kaj poeta vizio. Ĝi estas artifike konstruita, sed vive pulsas en ĝi la juno.

N-o 6. *Aŭgusto Strindberg*: Amo kaj pano. Aŭtuno. Tradukis: Leono Vienano. 41 paĝoj.

En la unua oni trovas realiste, vigle, sed ŝablone verkitan historion pri la ruiniĝo de materie nesufiĉe bazita geedziĝo, de malspertaj, senpripensaj junaj homoj. — Aŭtuno: majstra elegio pri la forpaso de l' juneco, profundsonda analizo pri la maljunigantaj geedzoj, tragike nuancita cignokanto pri la juneca amo. Ĉefverko kun monumente simpla rakontmaniero.

Leono Vienano bone tradukas. Riproĉinda estas lia sinteno koncerne la interjekciojn, kiujn li simple ne esp-igas, simile al aliaj tradukistoj. Sekve regas babela konfuzo rilate al ĉi tiuj vortoj, kiuj tiel gravas en *vivanta* lingvo! Kial ne konsentas niaj verkistoj pri unueca uzo? (provo por tio troveblas en la Parnasa Gvidlibro). Sur la Bang- kaj Strindberg-volumoj ne estas signite, ĉu la noveloj estas tradukitaj el la originalo aŭ el alilingva traduko.

La serio konvenas por komencantoj, sed ankaŭ plialtpretendaj legantoj trovos ion por si. Nur estas domaĝe, ke la miskvalita papero ne indigas la kajerojn por enbibliotekigo. Ludoviko Totsche.

S. GRENKAMP: POLA FOLKLORO KAJ POPOLKANTO. 60 paĝoj. Eldonejo: Esperantista Voĉo, Jaslo, Pollando. 1933. Prezo 1.50 fr. + 10%.

19433  
»Ekkonu la kanton de l' popolo kaj vi ekkonos la popolon kaj ĝian landon.« — diras la aŭtoro de la libreto, kaj vere, kio servus pli bone la alproksimiĝadon de la popoloj, ol la lingvo de l' popolanimo, kiu ekparolas en la kantoj. Kiu foje jam partoprenis kuman kantadon de diversnaciaj, tiu hejmenportis la pruvon de ĉi supra aserto en formo de neforgesebla travivaĵo. Kaj hejme kiomfoje oni pribedaŭras, ke la humorplenaj momentoj tiel rapide forpasis kaj ke oni ne havas antaŭ si tekstojn



kaj muziknotojn por ilin resorĉi kaj por plifirmigi sian konon pri fremda popolanimo. Nu, la libro de Grenkamp — kvankam en modesta kadro — volas servi por tia celo, kaj oni povas konstati, ke ĝi bone servas sian celon. Histori-geografia skizo, karakterizo de diversaj popolokarakteroj, studo pri la diversaj specoj de l' popola kanto, tekstoj (ili devus esti iom pli arte tradukitaj) kaj muziknotoj (bedaŭrinde iom malmultaj) ilustraĵoj, simpla esp-a stilo: ĉio ĉi faras la libron plaĉa. *Ludoviko Totsche.*

JOŠISI SIMOMURA: NOVA KURSO DE ESPERANTAJ LETEROJ. 368 paĝoj. Eldonejo: Japana Esperanto Instituto, Tokio. 1932. Prezo: 0.60 USA dol. + 10%.

Jen denove lernolibro japana, oni vere ne povus plendi pri malaktiveco de niaj japanaj samideanoj! La libro instruas la esp-an korespondadon, sed ĝiaj ampleksaj, fundaj notoj gramatikaj kaj stilaj vastigas ĝin je preskaŭ ĝenerala lernolibro de la lingvo. La libro konsistas el letertekstoj kaj japanlingvaj komentarioj, ĉi lastaj kompreneble restas misteraĵoj por eŭropa recenzanto, nur el la enteksitaj esp-aj vortoj oni povas iom konjekti la precizecon de ĉi tiuj klarigoj. La aŭtoro sendube estas unu el tiuj japanaj samideanoj, kies lingva talento vekas plej multe da espero. Sed, por ne tute preteri riproĉojn, mi ne prisilentas, ke sur paĝo 30. »estas venkita« malĝustas anstataŭ »estis venkita«, ke sur paĝo 103. anstataŭ »mi deziras, ke vi vojaĝos« mi sentas pli bonvena la uzon de u-modo en la subordonita frazo. »Vi ne vidas min jam por centjaroj« estas kurioza esprimo anstataŭ »Mi ne vidis vin jam de centjaroj«. Sed ĝenerale la stilo estas fidinda.

Se eŭropano trarigardas la amasajn instruilojn (gazetojn, librojn), kiujn la japanoj uzas por lerni esp-on, li ricevas la strangan impreson, ke nia lingvo estas tre malfacila por ili. Ĉu eblas, ke la lernado de esp-o postulu de japanoj tiom da laboro? Mi vere ĝojus, se en L. M. japana samideano klarigus al mi la aferon: kial la japanaj esp-istoj sentas la necesojn de tiel multaj lernolibroj, kaj kian malfacilecon al ili prezentas Esperanto. *Ludoviko Totsche.*

IVAN MAZURANIĆ: *La morto de Smail-Aga Cengijjić*. Heroa eposo kroata. Traduko kun antaŭparolo kaj klarigoj de Mavro Špicer. Eldonis »La Suda Stelo« — Slav. Brod, Jugoslavio, 1933. 76 paĝoj. Prezo: bindite 3 sv. fr. afr.

La poemo, malgranda epepo, ĉerpita el la krudaj tempoj de porekzistaj liberbataloj, impresas forte kaj freŝe. Ankaŭ tra la traduko oni eksentas la radikan popolan aromon de la versoj, ian pafortan, primitivan terordon, kiu sentigas en la lakonaj frazoj, penso-ritmoj, vortripecoj, en la simplaj sed fortefektaj bildoj, en la sugestaj komparoj. Kaj trans ĉi tiuj poeziaj valoroj, la ekstaza aspiro je libereco, kiu pulsas tra la tuta verko, la draste elokventa pripentro de la mizeroj de l' sklave subpremita, turmentata popolo, la frapanta alterno de krudaj, sangaj, animskue kruelaj scenoj kaj mildaj idiliaj bildoj: ĉio ĉi faras la verkon unu el la rimarkindaj trezoroj de la mondliteraturo. Ne mirinde, ke ĝi trovis tiel multajn tradukantojn: ĝia Esperanta traduko estas ĝia interpreto jam en la deka lingvo.

La epepo priskribas la agojn de la sangsoifa kaj oravida turka agao Cengijjić, kiu eltordas la haraĉon (tributon) el la kompatindaj rajoj (subuloj) per elektitaj torturoj. Pro lia krueleco, kies inferan furiozon

31.3.



animskue pentras la ĉapitro »Haraĉo«, ribelas la montenegranoj kaj en sanga batalo ili venĝas: Ĉengijiĉ falas. Ĉi tiu epizodo ekvivas antaŭ niaj okuloj kun konsterna forto, ribeligante kontraŭ ĉiu perforto kaj subpremo la koron de la leganto. Ne mirinde, ke en popolo, el kies historio ĝi estas prenita, ĝi fariĝis »la plej glora ornamo de la nacia literaturo«.

Koncerne la tradukon, oni devas plene rekoni la grandan fervoron, entuziasmon kaj klopodon de la honorinda tradukinto. Li havis antaŭ si malfacilan taskon, kaj li bezonis fortan volon, egan persiston kaj obstinan paciencon por ĝin fini. El ĉiu verso oni vidas la konsciencan penon, la amon al poemo: kiel li klopodis kiel eble plej fidele kaj perfekte proksimigi la tradukon al la originalo, transdoni ties ĉiujn belajojn, ties tutan apartan aromon, humoron kaj sento-mondon.

Sed certe ankaŭ li mem preferos, se la recenzanto ne restos ĉe la vortoj de ĝenerala kaj banala laŭdado, prisilentante ĉion, kion li trovis riproĉebla en la traduko. Mi esperas, ke li ne estas infektita de la rosentemo kutima en Esperantujo, kiu rigardas la objektivan kritikon kvazaŭ persona ofendo. Estas ja klare, ke la detala kritiko jam en si mem estas rekonio: pri malbona verko oni skribas eble malpli da riproĉoj, ol pri bona, ĉar nur ĉe la lasta oni estas pelata de la deziro: havi ĝin tute perfekta.

La unua kaj ĉefa kritiko rilatas al la vort-ordo. Estas klare, ke en poemoj ĝi povas esti pli libera, ol en prozo. Dum en bona prozo la personaj pronomoj staras ĉiam antaŭ la verbo, en poezio ili povas ĝin postsekvi. En poezio oni povas allasi ankaŭ la neapudecon de la substantivo kaj de ĝia epiteto (ekz. grasajn incitigis bovojn, ruĝan ankaŭ ĉapon surkapigis, ŝtonon li malvarman supreniris). Sed estas certaj limoj. Kaj trans ĉi tiuj limoj troviĝas ekzemple meti la prepozicion inter la substantivon kaj ĝian epiteton. Tia nepermesebla kaj neniam ekkutimebla vortordo svarmas en la teksto: Herceĝana en la lando, Cetinjo en Montenegro, tia per fortego, turkaj pro pedikoj, akra per lancrapo, herbon en verdetan, triobla pere (?) dento, fĉra de ĉenaro, meze ligna ia sur fostego (!), milda ŝafo lupo ĉe sovaĝa, koro en lia, tiu en momento ktp. ktp. Poste, oni nepre devas meti konjunkciojn kaj rilatajn pronomojn en la komenco de la frazo; do frazoj, kiel: Dion sed servadi kiu marŝas; ĉu ĝi kulpas Turkoj ke inertas; susuretas karan kaj kanteton (!); ambaŭ ke mortintoj dentgrincigas, ktp. ktp. — estas kaj restas en Esperanto ĉiam malagrablaj kaj vere ŝokas la leganton. Estas ja sciate, ke Zamenhof prefere rompis la severan jamban skemon, ol permesi al si tian inverson.

Krome estas ankoraŭ kelkaj kritikindaĵoj: la vorto *ago* anstataŭ *agao* ofte konfuzas, ĉar ĝi ŝajnas la Esperanta vorto *ago*. Nekonsilinda estas la kunfando de substantivo kun adjektivo: blanktendaro, pezferajo, fortleono ktp. La vorto *pafplenŝutis* estas monstraĵo. Ofte tre malbone aspektas la perforta elizio de la artikolo: Gacko l' kampo; l' gorgon laĉis; brava l' trupo ktp. Kelkfoje la tradukinto trokurage marŝas super la ruboj de la gramatika kaj sintakso: »Dion sed servadi kiu marŝas, devas, ke per pura koro servu.« »Pere d' ungoj fosas sangoplenaj.« »Oro, de brutaron ne havanto, sed post fremda sur montar' vagadas.« Kelkfoje la tradukinto mem sentas, ke la traduko restas iom enigma, kaj li klarigas la tekston en noto. Tion mi ne povas aprobi. Se oni neniel povas solvi la tradukon en la striktaj limoj de la versformo, oni prefere elektu iom pli larĝan version.



Tia ne feliĉa solvo estas ekzemple la bela parto, en kiu la poemo pentras la mizeran situacion de la rajoj torditaj por haraĉo:

»Tuj haraĉon!« De kie haraĉo? / Oro, de tegmenton ne havanto, / Kie l' kapon povus li kuŝigi? / Oro, de nek kampon posedanto, / Kiu turkan ŝvite perlaboras? / Oro, de brutaron ne havanto, / Sed post fremda sur montar' vagadas? / Oro, ĉu de lanon ne havanto? / Oro, ĉu de panon ne havanto?

Nu, oni ja povas kompreni la suprajn versojn, sed al la lingva sento ili certe ne prezentas plezuron. Oni povus provi eble:

»Tuj haraĉon!« Sed de kie preni? / Oron? dum tegmenton li ne havas, / Por kuŝigi sub ĝi sian kapon? / Oron? dum ja kampon li ne havas, / Nur la turkan prilaboras ŝvite / Oron? dum brutaron li ne havas / Sed post fremda vagas en montaro? / Oron? dum lanveston li ne havas? / Oron? dum panreston li ne havas? . . .

Sed mi vere ne volas ŝajniĝi per mia longa kaj detala kritiko, ke la verko havas nur tiajn partojn. Ĝi estas granda kaj bela laboro, kaj krome la libro estas tre plaĉa, bele ilustrita, bone bindita, eldonita kun ekstrema zorgo kaj amo.

Kopar.

SEPPIK—MALMGREN: SYSTEMATISK KURSI ESPERANTO. 88 p. Prezo: 75 öre. Eldonis: Förlagsföreningen Esperanto u. p. a., Stockholm.

Jen nova, bona lernolibreto, preskaŭ rektmetoda. Ĝi havas la avant-aĝon, ke ankaŭ sol-lernantoj — kompreneble nur svedoj — povas el ĝi lerni. Bonhumoraj rakontetoj, anekdotoj varias en la teksto de la lecionoj. Preso tre klara, papero bona, prezo malalta. Du modestaj rimarkoj: kial troigi? Sur p. 85. ni legas, ke UEA-delegitoj estas en pli ol 100 landoj. Laŭ la statistiko ni scias, ke oni atingis nur 80 ŝtatojn. Kaj kial modesti? Sur p. 86. ne estas cititaj ĉiuj gravaj grandaj kaj valoraj esperanto-gazetoj, kiuj meritis esti inter la rekomendindaj. La libro estas rekomendinda.

P. B.

STEFAN ZWEIG: LA OKULOJ DE LA ETERNA FRATO. Tradukis: Helene Wolf. 65 paĝoj. Propra eldono de la tradukintino. Preso: Heroldo de Esperanto. Köln. 1932. Prezo: 1.50 sv. fr. + 10%.

La verkisto estas unu el la plej noblaj figuroj de l' impresionista novromantiko. Suverene li regas ĉiun artistan ilon, esprimeblon, formon. Liaj noveloj estas preskaŭ psikologiaj studoj, kies tekniko atingas la kristalan perfektecon de l' klasika novelo kaj kies lingvo estas mirinde plastika kaj fleksiĝema. Kiel novromantikulo li havas ĉefteme la erotikon, la pasion, sed eĉ la bolgrada pasio parolas ĉe li malvarme ekvilibritan lingvon. Li ĉiam pli kaj pli proksimiĝas al plejinterno de homaj krizoj, homaj sortoj.

La temo de *La okuloj de la eterna frato*, kiun la verkisto nomas legendo, estas filozofio: la peza problemo pri la respondeco de l' homa ago estas en ĝi projekciita sur la ekranon. »La esenco de la ago estas abisme profunda« li citas el la hinda Bhagavatgita... Kaj la filozofian temon li vivigas en bildserio plena de oriente riĉa fantazio. La heroo, Virata, en la unua bildo montriĝas kiel triumfa armeestro (»fulmo de glavo« — li



estas nomata), sed samtempe kun la venko li seniluziigas pri la valoro kaj rajto de l' perforto. La okuloj de lia frato, kiu partoprenis la malamikan tendaron kaj kiun li senrekone mortigis en la batalo, traboris liajn koron kaj menzon: la triumfintan glavon li jetas for. En la dua bildo ni renkontas lin kiel ĉefjuĝiston (la popolo nomas lin «fonto de justeco») sed kiam li sur propra haito volas instrui pri la ĝusto de sia juĝista mezurilo, li konsciigas pri la vaneco kaj problemeco de ĉiu homa juĝo. La ĉapitro pri la semajnoj pasigitaj en la subtera malliberejo apartenas al la plej tragikokolare avidaj panegiroj al la individua libereco. Forjetinte ŝtatajn oficojn Virata vivas paco en sia domo servante al la homoj anstataŭ juĝoj per siaj nedevegaj, sed pie akceptataj konsiloj. («Kampo de l' konsilo» estas lia nomo.) Kaj la okuloj de sklavo batita de liaj filoj (okuloj tiom similaj al tiuj de lia mortigita frato, ho eternaj okuloj de la eterne mortigata frato!) klarigas lin, ke eĉ paca reliriĝo estas ago, ago maljusta kaj perforta kontraŭ tiuj — liaj sklavoj — kies pena laboro aĉetas lian pacon kaj bonecon. En la kvara bildo Virata vivas ermite en soleca arbaro, li retenas sin de ĉia ago, volante eviti per tio, ke li influu la vivon de aliaj: »Tiu, kiu intencas vivi sen kulpo, ne rajtas partopreni je domo kaj fremda sorto, ne rajtas nutriĝi de fremda penado... Anstataŭ agi li nur rigardas: »Sed estis bone, esti nur kiel vidanto super ĉi tiuj bataloj, ne partoprenante en ĉiu kulpo en la kreskanta rondo de detruo kaj liberigo.« Sed hazardaĵo, kiu rekondukas lin inter homojn, konvinkas lin, ke eĉ la neago estas influopova, eble eĉ en la plej danĝera maniero... Lia fina konkludo: »Mi ne plu volas esti libera de mia volo. Ĉar la liberulo ne estas libera kaj la neaganto ne sen kulpo. Nur tiu, kiu servas, estas libera, tiu kiu donas sian volon al alia, sian forton al ago kaj kiu agas sen demando.« Kaj li akceptas plej humilajn servon.

La negativa prezento de l' problemo estas brila, sed ĉu la pozitiva konkludo alportas la veran solvon?

La stilo de la legendo estas intence simpla kaj tio feliĉe helpis la tradukintinon, kiu bone plenumis sian taskon, kvankam estas senteble, ke rutino ankoraŭ mankas al ŝi. La originalo estas iom sklave sekvita, kelkfoje eĉ en vortordo nenatura al Esperanto. Estas rimarkebla la nesufiĉe kritika uzo de germana-esperanta vortaro. Sed ĉio ĉi tamen ne rezultigis grandajn mankojn, ĉar la originalo plejparte lasas sin laŭvorte traduki. Estus evitinda la multfoja duobla uzo de prepozicioj (forflugis for, surmeti sur, alrigardi al.) Anstataŭ *scikoni* sufiĉas *koni*. Sur paĝo 12. *demando* estas erare uzata anstataŭ *peto*. »Venteganta maro» terue sensanga esprimo, la P. V. enhavas *tempeston* kaj *stormon*, kial oni timas ilin? »Putri je la jaroj»: ĝustas »tra la jaroj». »*Malsupreniĝus*» monstraĵo netolerebla en Zweig-prozo, se la tradukintino ne riskis uzi la verbon *sinki*, kial ŝi ne skribis simple: *falis*? *Esteco* estas superflua kaj malbona anstataŭ la simpla *esto*. Sed ĉi tiuj riproĉetoj ne fuŝas la ĝenerale favoran impreson pri la traduko.

Papero, preso tre bonaj. La ksilografajoj de Fritz Dücker estas plaĉaj kaj harmoniantaj kun la teksto.

Ĉi tiun libron mi metus en la manon de l' junularo komprenanta Esperanton, se tia junularo entute ekzistus. *Ludoviko Totsche.*

UNUJ LIBROJ DE KONFUCIANA BIBLIO. Granda lernado kaj Doktrino de Mezeco. El ĉinlingva originalo tradukis Kiuĉi Nohara. Eld.: Japana Esperanto-Instituto. 65. p.



La tradukoj de la du unuaj libroj de la Konfuciana Biblioteko estas veraj ora kompletigo de la esp-<sup>a</sup> literaturo. (Ĉetero ilin ne Konfucio mem verkis, sed liaj disĉiploj kaj sekvantoj.) La ĉefa enhavo estas konsiloj, instruoj, precipe — en la dua libro — al reganto de popoloj. Intere la instruoj ki trovas valorajn sentencojn, parte retroveblajn en la kristana teologio. Ekzemple: »Kion vi ne deziras, ke aliu faru al vi, tion vi faru al aliu.« »Simileco ekzistas inter pafarko kaj la konduto de homoj: kiam oni malsukcesis ektrafi celmarkon, oni sin turnu al si kaj serĉu la kaŭzon en si mem.« (»Celmarko« estas malgusta anstataŭ »celbulo«.) »La harmonio estas la ĝenerala vojo, sur kiu devas iradi ĉiu.«

La traduko ne tute kontentigis min, ĉar la frazoj estas ofte neuzaj kaj mi legus la ĉinan originalon el multaj jarcentoj antaŭ Kristo. Eble el simila vidpunkto estas valore, ke la tradukinto volis fidele redoni la originalon, sed tio trosekigas la tekston.

P. B.

M. GUTERMAN. Słownik jez. Esperanto (Vortaro de la lingvo Esperanto). Eldonis »Hawus«, Warszawa. P. 387 + XXXVIII. Prezo 10.— zl.

La pola esperantistaro, kiu sendube havas sian gravan parton en la historio de Esperanto kaj ĝia literaturo, ĝis nun posedis nur unu plenan vortaron poleserantan (kaj inversan) de A. Grabowski. Ĝi vere estis la sola, sed neanstatebla: en ĝi la aŭtoro prezentis la maksimumon, kiun oni antaŭ 20 jaroj povis elkombini per la disponata tiutempe vortmaterialo. Kaj se iafaje lia esperantigo de iu nacilingva vorto ne estis tute trafa, ni verŝajne devas serĉi la kaŭzon en la fakto, ke dum tiu periodo ĉia inklino al neologismoj, eĉ plej necesaj, estis subpremata de niaj tiamaĵ gvidantoj (ne forgesu, ke tio estis post la Ido-skismo). Lasttempe la pol-esperanta parto tute disvendigis, lasante la polan esperantistaron sen taŭga vortaro.

La verko de Guterman, kiu aperas en momento de vera bezono al pol-esperanta vortaro, estas bazita sur la Grabowski-vortaro. Ĝi estas riĉa kaj plena vortaro, zorge prilaborita. La kompilinto ne sole tradukis precize ĉiun vorton, sed apudmetis ankaŭ la diversajn nuancojn, kio certe estas tre valora por la pli spertaj lingvouzantoj. Tamen kelkajn mistradukojn de Grabowski li ne ŝanĝis. Ekz. la vorton »obława« (neatendita invado de polica taĉmento en iu loko) li — simile al Grabowski — tradukis »pelĉaso«. Verdire, ni per la oficiala radikaro ne povus krei por tiu ideo trafan terminon kaj diskutindas, ĉu la aŭtoro apud la malbona »pelĉaso« ne devus kuragi sugesti novan vorton, kiun postulas la neceseco. Mi eĉ utiligas la okazon por tiucele proponi la vorton »raflo« el la franca.

Tre utilaj estas la trovigantaj en la komenco de l' verko resumo de gramatiko esp. kaj plena tabelo de afiksoj kaj prefikse uzataj prepozicioj. Por klera homo tiuj aldonoj povas simple servi anstataŭ lernolibro.

La dua parto de la granda verko prezentas vortaron E-polan kaj konsistas nur el la oficiala radikaro kaj la vaste uzataj internaciaj vortoj. Ĉu konsiderante la amplekson de la pola-esperanta parto, ne estus konsilinde en la inversa parto same amplekse arigi ne nur la radikojn sed ankaŭ la derivaĵojn proprajn al la komuna lingvouzo?

Preserarojn mi ne trovis.

Resume: la vortaro estas bonega kaj rekomendinda al ĉiu pola esperantisto. Aĉa bindaĵo.

*I. Lejzerowicz.*



## AELA-libroj por 1934.

Laŭ la regularo la membraro de AELA rajtas mem balote elekti tiujn librojn, kiujn ĝi preferas ricevi por sia kotizo.

Por plenumi tiun promeson, komence de la jaro ni sendis leteron al ĉirkaŭ cent konataj esperantistaj verkistoj kaj tradukistoj, por peti iliajn konsilojn pri la libroj, kiujn ni balotigu. Alvenis proponoj pri ĉirkaŭ kvindek libroj, el kiuj 19 librojn en 20 volumoj nun ni metas por via elekto. Kiel ni jam diris antaŭe, ni donos al vi en la venonta jaro ne 1800, sed ĉirkaŭ 2500 paĝojn da libroj. Kompreneble ni tion povas fari nur en la espero, ke vi ne nur restos fidelaj, sed faros ĉion eblan, ke ni atingu jam en tiu ĉi jaro la budĝetitan membronombron, kio ja estas ne tro alta kaj kies 60% ni jam nun havas. Restas do ankoraŭ ses monatoj por varbi al nia organizaĵo kaj ni kredas, ke vi plene eluzos tiun tempon plej bone. Dume ni konatigas al vi la deknau verkojn aldonante malantaŭe balotilon. Bonvolu atenti, ke:

Ĉiu membro rajtas indiki librojn ĝis paĝonombro 2000—2200. La restajn 3—500 paĝojn ni retenas por ni mem, por ke ni povu lasi lokon al ŝangeblaj libroj.

La libro *Hekler Antal: Arthistorio* estas indikata en du volumoj. La unua temas ĝis la renesanco, la alia post la renesanco. Ili estas elekteblaj ankaŭ tiel, ke la unua volumo, en si mem memstara aperu en 1934. kaj la dua, same memstara en 1935. Tamen, elektante tiun ĉi libron, oni rajtas elekti ĝenerale tiel, ke 100 paĝoj de tiu libro egalvaloras 150 paĝojn el alia, pro la multaj kliŝoj, kiujn la verko enhavas.

Kaj nun jen la balototaj verkoj:

### Tradukajtoj:

*Ĉeĥoslovaka Antologio*. Redektas R. *Hromada*, tradukas la kunlaborantoj ĉeĥoslovakaj de Literatura Mondo. Aspekto, amplekso, enhavo simila al la Hungara Antologio. 500 paĝa, sed ĉe la baloto pro la grandeco de formato kalkulas kiel 650 paĝoj.

Pri tiu ĉi verko ni ne devas diri multe. La redaktoro kaj tradukantoj estas bone konataj antaŭ ĉiu esperantisto, la eminenta ĉeĥoslovaka literaturo estas multloke bone konigata kaj tio, ke ni similigas kaj opinias ĝin egalvalora al Hungara Antologio, estas sufiĉa konigilo.

*Franz Werfel: Abiturienta renkontiĝo*. Tradukas el la germana O. *Ginz* aŭ I. *Lejzerowicz*. ĉirkaŭ 220 paĝoj.

»Kontraŭ grandaj kvalitoj de aliulo ne estas alia savilo, al la amo.« Ĉi tiu Goethe-citajo enkondukas la Werfel-romanon kaj ĝi koncize ampleksas la ĉeftemon de la libro. La dudekkvinjara datreveno de la abiturienta ekzameno (kun kia viveco, kun kia kruelo, kun kia — preskaŭ fantoma — naturalismo, kaj tamen kun kia rezigna melankolio estas priskribita ĉi tiu renkontiĝo!) estas nur preteksto, por ke la ĉefheroo rakontu la historion de sia junaĝa kulpo, kiun li ne povis eviti, ĉar li ne ektrovis la solan savilon kontraŭ la intelekta kaj karaktera supereco de sia kunlernanto kaj amiko... La angela poeto de l' senlima kaj amorfa bono, puro kaj kunsento ĉi tie trudis al si la disciplinon de severa strukturo kaj kun la helpo de sia delikate palpa psikologio, de sia vizia hom-prezenta kapablo, de sia



certpaŝa orientiĝo en la komplikajoj de l' junula animo, li kreis verkon, kiu apartenas al la plej belaj, plej humanaj, plej respondeplenaj libroj, verkon, kiu gvidas nin tute proksime al la eternaj problemoj de l' vivo mem.

*Stefan Zweig: Amok.* El la germana originalo *K. Kalocsay aŭ L. Totsche* 88 paĝoj.

Alojisto de vortoj estas Zweig, de vortoj noblaj, puraj kaj metale brilaj. Metiiste li martelas, formas, ĉizas sian materion, sed li almiŝkas misteran vivigan elementon: la homan animon, la homan suferon, sian propran animon, sian propran suferon... Malvarme brilas la farita art-verko, sed ĝia rigida ekvilibro, ĝia spegulmaniera enfermiĝemo kaŝas en si abisman haoson de doloraj vibradoj de l' karno kaj animo, kiel la indiferenta trankvilo de l' materio nur maskas la internan turniĝon kaj koliziadon de l' atomoj... Kaj eble neniam estis tiel ĝiseksplode streĉita la interna pulsado de liaj vortoj, kiel en la Amok-kuranto, en kiu li per certa mano ekkaptas kaj prezentas la organismon de l' vivo en ĝia plej intensigita momento: en la stato de l' *pasio*. Eble neniam li trasentis tiel tragike la korpon, eble neniam li rigardis tiel profunde la koron... Speciala kazo en ekzotika ĉirkaŭaĵo estas la temo, sed en ĝia spegulo kiu ne rekonus sin mem, siajn abismojn, la terurajn eblojn de sia propra sorto? La novelo »Amok-kuranto« apartenas al la plej sentempaj valoroj de la mondliteraturo.

*Andrée Gide: La Sinfonio Pastoral.* El la franca *G. Waringhien*. Ĉ. 88 paĝoj.

La Sinfonio Pastoral estas eble plej pura, plej klasika verko de la ĉiam florinta kaj ĉiam juna Gide. La pastro de l' svisa Jura-montaro triumfe ekpaŝas en ĝi en la mondliteraturon, senpretende, modeste, ĉe sennome, sed kies ŝajna idilia vivmaniero kaŝas en si nuran danĝeran soifon, nurajn teruritajn demandojn, kaj pro kies animo (kiel pro ĉiu heroo de Gide) anĝeloj kaj demonoj interbatalas. Ĉar en ĉi tiu malgranda montara vilaĝo, en ĉi tiu biblia pastrodomo, kaj en la notoj por si mem skribitaj de ĉi tiu sennoma pastro, ne nur la sorto de ĉi tiu juna knabino, de ĉi tiu blinda Ofelia decidiĝas, ne nur la maljuniganta viro kaj la adoleskanta knabo batalas, sed el la profundo de ĉio ĉi, de post la pastra destino, la malfrua amo kaj la geedziĝa vivo, la eterna dilemo de l' senkredaj kredantoj, de l' humilaj ribelantoj, de l' neniam trankviliĝantoj rompas al si vojon: ĉu la amo aŭ la lego? ĉu instinkto aŭ disciplino? ĉu ĝojo aŭ rezigno? ĉu libereco aŭ obeo? ĉu Kristo aŭ Paŭlo? Kaj ni admiru ĉi tiun eteran miraklon de la stilpureco, kiu, sen perforto kaj troigo, malkaŝas ne nur la rolantojn de la historio, sed ankaŭ la taglibranton mem, ĝis la plejprofundo de l' animo, ĝis tie, kie ne nur ĉe la pastro, sed ĉe ni ĉiuj, eble foje ankaŭ ĉe la teoriisto Gide, miksiĝas la sopiroj kun la ideologioj, la moralo kun la instinktoj, la evangeliaj ordonoj kun plej interna anarkio, kaj ĉi tiu miksiĝo naskas la voĉon de la taglibro, kiu estas jen puritana, jen subite emfaza, biblie pia, kaj krome sinperfide groteska, kaj kiu estas inde glorigita triumfo de la gide-a klasikeco.

*Lewis Sinclair: Dr. Arrowsmith.* El la angla originalo angla kolektivo el la kunlaborantoj de Literatura Mondo. La grandegan ĉ. 900 paĝan romanon ni eldonas en du volumoj.

Tiu ĉi romano estas la plej bona verko de la Nobelpremiito Sinclair



En ĝi la verkisto priskribas la vivon de scienculo, kiu baraktas en la nuna mondo de pseŭdoscienco. La homo, serĉanta kontentigon por siaj noblaj talentoj, devas trati multegan malhelpon ĝis li atingas la celon: vivi nur por la scienco, por la altigo de la homa kulturo. La verko apartenas al tiuj, kiuj aperas tre-tre malofte en la mondliteraturo kaj en kiuj la verkisto kreas monumenton por si kaj por la epoko de li travivata.

*Aŭgust Gailit: Toomas Nipernaadi.* El la estona de *H. Seppik kaj Hilda Dresen.* ĉ. 500 paĝa.

La romano konsistas el 7 apartaj noveloj. La heroo de tiuj noveloj estas romantikulo, fantaziulo, optimista rezignantulo je ĉio krom libereco. Li vivas vintre kun sia familio, sed dum la aliaj sezonoj li vagadas, serĉante aventurojn. Preskaŭ ĉie, kie li ekhaltas por ia tempo, li enamiĝas, sed li postulas al si nek riĉaĵon, nek amon, lia amo ĉiam restas platona. Li havas plej kuriozajn aventurojn ĉar mankas al li nek humuro, nek fantazio, sed li scipovas esti melankolia kaj delikatsenta. Iam aparta freŝeco kaj originaleco frapas nin el la libro, kies partojn oni povis legi ankaŭ en Esperanto sur la paĝoj de la estona numero de L. M. La verko cetere jam aperis en pluraj aliaj lingvoj.

*Jeluŝić: Cezaro.* El la horvata eldono, kontrolita de la aŭtoro mem, tradukas Ivo Rotkvič. Ĉ. 500 paĝa.

Kiam eliris »Cezaro«, la tutmonda kritiko, eĉ tiu de Ameriko tuj akklamis ĝin kiel unu el la plej sensaciaj »romano-biografioj«, iam ajn verkitaĵ. En sole du jaroj eliris dudek germanaj eldonoj kaj krome ĝi estas tradukita en pli ol dek lingvojn.

Jeluŝić sukcesis verki grandiozan libron el malfacila kaj tempofora materialo. La libro estas mirige plastika, okazoturna, kvazaŭ la plej aventura filmo kaj krome tre ofte profunda kiel la abismaj paĝoj de Dostojevski. Plena de plej subtilaj »agordoj« la libro genie kreas la psikan memon de Cezaro, ŝajne unu el la plej rimarkindaj pilotoj de la homa sorto...

(El tiurilata artikolo en Literatura Mondo.)

*Jun-Iĉiroo Tanizaki: Printempo furiozas.* El la japana *Joŝiŝi Simomura.* Ĉ. 140 paĝa.

La moderna japana literaturo plene absorbigis de la aventura romanoj de okcidento. Tamen ili estas pli interesaj por okcidentanoj per tio, ke samtempe ni vidas en ili la vivon de japana popolo, ofte tre kuriozan kaj strangan por okcidenta menso. La verkisto estas konata kiel la plej populara verkisto de Japanujo kaj posedas tiom vastan eŭropan kulturon, ke nemirinde, se ni trovas lian ĵenan romanon unu el la plej bonaj kunfandoj de la okcidenta aventurromano kun la orienta mondo. La tradukinton ni ne devas aparte prezenti, ĉar li jam estas bonege konata per siaj multaj tradukaĵoj el la japana lingvo.

*Francisko Kõrmendi: Budapeŝta Aventuro.* El la hungara *Karlo Bodó.* Ĉ. 60 paĝa.

La juna verkisto fariĝis subite konata, kiam per sia unua, supre nomita romano, li gajnis amerika-anglan literaturan konkurson. De tiam lia verko aperis ankaŭ hungare kaj en ĉiuj gravaj lingvoj. Parolu anstataŭ ni nederlanda samideano, kiu legis la libron kaj spontane sen-



dante al ni, hungaroj, grandan konatigon pri ĝi, skribas inter aliaj:

»La titolpaĝo de ĉi tiu libro konigas al ni kiel, aŭ pli bone dirite, pro kio estiĝis ĉi tiu verko de ĝis nun nekonata aŭtoro, kies verko tiom enociis kaj skuis la tutan intelektan mondon. Tamen, ankaŭ sen tio ni ja komprenas la instigojn de la verkisto, ĉar la tuta libro mem diras tion al ni... Ne estas mirige, se la verko akiras saman famon, kiel ekz. la verkoj de Remarque... Konklude mi povas diri, ke la verko estas hipermoderna libro, kiu montras al la leganto la grandan mizeron de la nuntempe tre multaj senlaboruloj, sed pli vere de la nuntempa ekonomia kaj ideo mondo, kaj Kõrmendi faras por ni bildon pri tiu mondo en tiom akraj kaj helkoloraj konturoj, ke nin kaptas tremiga sento kaj dubo pri tio ĉu ni saviĝos el la granda mizero, kiu nun regas la mondon... Sed la verko de Kõrmendi estas el literatura vidpunkto sendube granda sukceso kaj meritas la admiron kaj atenton de ĉiu, kiu kuraĝas kondukigi sin de literatura verko, kiu en ĝusta, kvankam iufoje kruda maniero prezentas al sia leganto la venkon de la »espero« kaj aliflanke la malvenkon de tiu, kiu ne esperas, almenaŭ ne volas esperi.

*Antoni Slominski: Mia vojaĝo en Sovetio.* Tradukas: S. Grenkamp-Kornfeld. Pri la nuna Sovetio estas tre riĉa la mondliteraturo. La ĵena verko faris sensacion ne nur en Polujo, sed ankaŭ en Germanujo kaj aliaj landoj pro sia senpolitika objektiveco. Jen la enhavo: En la vagono, Post la ruĝa pordego, Kolektiva domo, Vespero en Kino, Kio estas en la antaŭaj butikoj? Eksterlandanoj en Moskvo, Oro, kio ne estis, Moskvaj loĝejoj, »Dworiec Truda«, Mikroboj, SPU, Kreml, Muzeoj, Muzeo de revolucio, Teatro, »Hamlet«, Loterio, Blankaj noktoj, Peterburgo, Interparolo kun frato, Rigardado en okulojn, Kontraŭreligia muzeo, En pola legacio, Sosizdat, Interparolo kun Pudovkin, Kial mi ne skribas pri la kvinjara plano?, Juĝejo, Armeo, Parado, La lasta Nokto, Reveno.

La ĉirkaŭ 160 paga libro estas do varia kaj konatigas min pri la nuna vivo en Sovetio.

*Leo Belmont: La homo pri kiu la mondo ridas.* Rakonto, kreita sur la fono de la »Cirko« de Charlie Chaplin. El la pola *Anna Weinstein* ĉ. 250 paga.

La verkisto estas bone konata inter ni, ĉar kvankam verkanta pollingve, estas unu el la plej konataj esperantistoj, ne nur en Polujo. Jen kelkaj kritikoj pri la verko: »Tiu ĉi libro enhavas multajn humorajojn kaj gajegeajn faktojn pri la vivo de malfeliĉulo, orfo, kaj arlekeno — Charlie Chaplin. Ĝi estus tre ridinda kaj amuza, se ĝi ne estus tiel malĝoja. Jes, ĝi estas tre malĝoja. La aŭtoro skribas per sango de sia koro, indikante tre multe da maljustaĵoj en la mondo... La aŭtoro per la buŝo de sia heroo kaj per liaj travivaĵoj iamaniere tuŝas la plej komplikitajn aferojn de la vivo. La libro, skribita per genia plumo de fama verkisto, estas plensarkasma kontraŭ kritikistoj, librovendistoj kaj eldonistoj, trouzantaj la aŭtorojn.

Alia kritiko: Se konata Charlie Chaplin ne priskribis ankoraŭ sian aŭtobiografion, mi konsilus al li ĉerpi la materialon tiucele el la verko de Belmont. Belmont estas mokema, sed ne malica, li neniun ŝparas, eĉ sin mem ne. Lia armilo estas malpeza, subtila sarkasmo — inteligenta kaj



kultura. Sed tiu ĉi satira flanko en la rakonto pri Chaplin estas nura ŝminko de arlekeno, kiu post komike kurbigita masko kaŝas melankolion de malgaja animo...

*Leo Belmont: Messalina.* Du volumoj, entute ĉirkaŭ 800 paĝoj. El la pola tradukas *Anna Weinstein.*

Jen parto el kritiko: Ĉi tiu unua verko pri Messalina estas majstro-verko... Ni ĉi tie admiras lin (la verkiston) konulo de epoko, kiun li intencis rekrei, artisto kaj liberpensulo. Pri judaismo nenie oni skribis tiom, kiom en tiu ĉi verko de Belmont... Grandioza estas la fono, sur kiun Belmont jetis per sia genia plumo sortojn de sia belega, amsoifa heroino. En tiu ĉi fono mankas neniu detalo el tempoj de Messalina, neniu moro kaj kutimo... Kaj la heroino mein? La aŭtoro penas antaŭ ĉio trovi en ŝiaj »amfuziozoj« psikologiajn motivojn kaj en ŝia karaktero homajn ecojn. Li penas kompreni ŝin por povi ŝin senkulpiĝi antaŭ pasinteco, kio tamen ne signifas, ke li ne priatentas ŝian seksan senbridon... Messalina pereas fine kiel ŝtatkrimulino, ĉar ŝi volas sentronigi sian edzon kaj surtroniĝi sian amaton. La postaj jarcentoj kondamnis lin, ĉar la atenco — ne sukcesis... Tiel grandioza verko, kiel Messalina ne baldaŭ aperos en la pola literaturo.

*Antal Hekler: Arthistorio.* El la hungara iu el la redaktoroj de Literatura Mondo.

I-a volumo. Ĝis la Renesanco. Ĉirkaŭ 128 tekstopaĝoj kaj 80 bildopaĝoj kun ĉirkaŭ 120 ilustraĵoj. Ĉe la baloto kalkulas kiel 320 paĝa libro.

II-a volumo. De la renesanco ĝis hodiaŭ. Ĉirkaŭ 128 tekstopaĝoj kaj 48 bildopaĝoj kun ĉ. 90 ilustraĵoj. Ĉe la baloto kalkulas kiel 270 paĝa libro.

Antal Hekler estas profesoro en la Universitato de Budapeŝto kaj fame konata en sia fako de arthistorio en sciencaj rondoj. Lia resumita verko bone unuigas en si multajn bonajn kvalitojn de la malnova pozitivistaj kaj nova ideohistoriaj direktoj. Ĝi staras sur solidaj bazoj, ĉar estas konstruita sur forta historia bazo, sed la granda impeto, fantazio, konstanta rilato kun la aliaj terenoj de la spirita vivo, kiu igas la verkon ege alloga kaj interesa, metas la verkiston en la vicon de la plej modernaj arthistoriistoj. La verko estas bonŝanca miksaĵo de scienco kaj intuitiva fantazio. Malfacile ni povus rekomendi pli taŭgan verkon al tiu, kiu mallonge, tamen funde kaj elcerpe volas informiĝi pri la arthistorio de la mondo. La verko de Hekler estas certapaŝa, vasthorizonta, facile legebla gvidanto ekde la unuaj restaĵoj de la egipta arto ĝis la plej freŝaj pecoj de la modernaj artaj tendencoj. La verkon akompanas abunda bildmaterialo, kiun la verkisto klarigas per aparta teksto, farita kun granda analizkapablo. Tial ni devas diri, ke la trastudo de la ilustraĵoj mem rezultas eksterordinarajn profitojn por la leganto, ĉar ĝi kvazaŭ lude kaj amuze instruas la observanton vidi kaj rigardi. Tiu teksto donas al la leganto tiajn vidpunktojn, ke li poste kapablas taŭge kritiki ĉiujn artobjektojn ĉu antikvajn, ĉu modernajn, kiuj venas antaŭ li. La verko estas belega kaj moderna instruilo de la moderna inteligenta homo.

Kaj nun ni transiru al niaj



### Originalaj verkistoj

*Stellan Engholm*, la verkinto de *Al Toronto kaj Homoj sur la Tero* verkas malgrandan romanon pri la vivo de geknaboj en Toronto. Engholm estas instruisto, li pasigas preskaŭ tutan sian vivon inter infanoj, ne estas do mirinde, ke li konas plej bone la infanojn mem. Speciale do ĉi tiu verko lia devas esti la plej interesa, ĉar en ĝi parolas verkisto pri temo, de li plej multe ŝatata. La libro estos ĉirkaŭ 128 paĝa.

*Izrael Lejzerowicz* pretigis jam sian manuskripton »El la Verda Biblio« kaj »Taglibro de Horaĉo Sercer«. Ambaŭ specojn de la noveloj konas jam bone kaj ĝoje la legantoj de Literatura Mondo, kie aperis kelkaj el ili. La noveloj ŝprucas bonhumorajn observojn el la vivo de esperantistoj kaj la satira tono prezentas al ni niajn proprajn mankojn, malvirtojn. La verko estos proksimume 128 paĝa.

Saman specon apartenas la verketo de *J. Sapiro* sub titolo: »Tra nia verda mondeto«. La verkisto jam estas bone konata antaŭ ĉiu per sia »Babiladoj de bonhumora Zamenhofano«, per la kongresaj raportoj, aperintaj en ESPERANTO sub nomo Joŝo. La skizetojn akompanas tre taŭgaj kaj bonaj karikaturaj. Sur la proksimume 100 paĝoj ni trovos refreŝigon post la ĉagrenoj, kiuj ofte trafas nin en la vivo.

*Francisko Szilágyi*, la verkinto de la novelaro »Trans la Fabeloceano«, kiu verko ricevis nur laŭdajn recenzojn, redaktoro de Literatura Mondo, tradukinto de multaj libroj, laboras nun pri granda romano, preparolanta la sorton de eltrovantoj, inter ili ankaŭ tiun de Zamenhof. Pro tio estos speciale interesa por ni, esperantistoj la ĉirkaŭ 200 paĝa romano, kiu bone memorigos al ni la kaŭzojn, kial inventaĵoj ne tuj estas akceptataj de ĉiuj aklame.

Fine novan verkiston ni prezentas al nia legantaro. *H. Weinhengst* estas recenzisto de LA SOCIALISTO. Lia unua romano pentras antaŭ ni per multaj koloroj la nunan vivon de senlaboraj laboristoj. Ĝi prezentas al ni, kiel ŝanĝiĝas la vivo de molestaj, konstante laborintaj laboristoj per la senlaboreco al kadukiĝo, frenezigo, friponiĝo. La verkisto estas flua rakontanto. Li pentras nur per malhelaj koloroj, sed ja tia estas la vivo de senlaboruloj. En Weinhengst ni trovas novan multpromesan talenton kaj ni kredas, ke post ĉi tiu, proksimume 200 paĝa romano li portos al ni ankoraŭ multajn aliajn rakontojn el la vivo de la industriaj laboristoj.

Jen do ni prezentis al vi preskaŭ la trioblon de tiu kvanto kiun vi rajtas elekti. Vi havas do riĉan elektaĵon. Se vi ŝatas la originalan literaturon, vi povas elekti ĉe kvin librojn, se vi ŝatas verkojn aŭ antologiojn, aŭ ion alian, por preskaŭ ĉiu tendenco vi trovas reprezentanton. Nun do dependas plene de vi, kian libron vi deziras ricevi. Kompreneble, povas okazi, ke via ŝato ne korespondas kun tiu de la plimulto en iuj libroj kaj tiam vi devos rezigni favore al la plimulto, tamen vi grave influas kaj tial ni devas vin insiste peti, ke vi nepre balotu. Ni ja volas per ĉi tiu procedo, kiu estas por ni sufiĉe elspeziga, vidi, kio estas la deziro de la granda plimulto de nia membraro. Ni esperas, ke ni ricevos la baloton de ĉiuj membroj niaj kaj ke vi montrós senton de respondeco kontraŭ vi mem, kontraŭ via poŝo. Ni do atendas vian baloton plej urĝe kaj certe.

Kun koraj salutoj

Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj.



## DIVERSAĴOJ

*Flirto Esperanta* de Edz-Peranto. Eldonis N. Szapiro, Warszawa. Prezo 0.50 sv. fr. — Nova societa ludo, uzota dum grupkunvenoj.

*IPE-kalendaro* por 1933. eldonita de IPE. Berlin G. 25. Poŝtfako 2 48 paĝa, poŝformata kalendaro kun notindaj datoj el la laborista movado, kaj adresaro de lab. esp. organizaĵoj, proksimaj aŭ membroj al IPE. Prezo 50 germ. pf.

### GVIDLIBROJ KAJ PROSPEKTOJ:

*Kontraŭ la regantaj perceptoj pri krimo kaj puno.* Verketo de D-rino Clara Meyer Wichmann, el la nederlanda trad. Nikune. 13×20 cm. 8 paĝoj plus kovrilo. Eldonejo ĉe H. Philipps, Amsterdam Z. Olympiaweg 56. Prezo sv. fr. 0.10. Interesa broŝureto pri la supra temo.

*Gvidlibro tra Tallinn;* Esperanto Turista Komisiono, Tallinn Pasta kaste 6.

*Bingen;* Magistrato de Bingen Rhein, Germanujo

*Foiro de Budapest;* 6—15 majo 1933.

*Köbenhavn,* Turistforeningen for Danmark, Kopenhago, Vestre Boul 18

*Aŭstrio,* Ministerio de Trafiko, havebla ĉe Internacia Esp. Muzeo WIEN, I. Neue Burg.

*Varna,* Bulgarujo, Banejdirekcio.

La gvidlibroj de Tallinn kaj Varna estas bele ilustritaj 16 paĝaj libretoj. la aliaj estas la kutimaj belaj faldprospektoj, tiu de Aŭstrio ornamata per la geografia karto de Aŭstrio. Ĉiuj estas senpage riceveblaj ĉe la adresoj, metitaj apud ilia titolo.

## NIA POŝTO

*Al ĉiuj membroj.* Pro teknikaj kaŭzoj ni devis ŝanĝi la 2-an libron kun la kvara kaj tial kun ĉi tiu numero vi ricevas la libron *Sorĉistino et Kastilio*. La sekva numero de la Bibliografia Gazeto kaj la verko *Pri l' Moderna Arto* estos ekspedata komence de aŭgusto. Nun kune ni sendas al ĉiu ankoraŭ nericevinta, la trian libron. Al la membroj, kiuj ne indikis specialan deziron pri la tria libro ni sendis ĉe broŝurita membro *Pilgrimo* kaj *Preter la Vivo* aŭ *Dancu Marionetoj*, ĉe bindita *Eŭgeno Onegin* aŭ *Dancu Marionetoj*. Se ni ne estus bone trafintaj, bonvolu ne kulpigi nin, resendu la libron ricevitan kun la indiko de via deziro kaj pago de unu respondkupono por novaj sendkostoĵoj.

*S-ano Ingen, Rotterdam.* Dankon por via entuziasma helpo. La administranto de AELA kaj Literatura

Mondo volonte konatiĝos kun vi ankaŭ persone dum sia prelegvojaĝo, okazonta komence de aŭtono en tiu ĉi jaro.

*Al ĉiuj gratulintoj* ni sendas koregajn dankojn. Ni certe daŭrigos labori kiel vi bone vidas el la plano de 1934. sed ni nepre deziras vian helpon. Montru ĉie Hungaran Antologion, ne forgesu varbadi por AELA. Ja tio estas nun multe pli facile ebla, ĉar la nun aliĝanta membro ricevas por sia kotizo samtempe tri librojn. Por helpi vin, ni publikigas en tiu ĉi numero ankaŭ la enpagejojn por AELA.

*Al la partopagantoj* ni enmetas hodiaŭ enpagilojn por la pagoj farotaj la 1-an de junio kaj 1-an de aŭgusto, ĉar ĝis tiu dato nova sendaĵo ne eliros. Bonvolu bone uzi la enpagilojn.

*W. G. Adams, Seattle kaj aliaj*



*membroj pere de BEA.* Ni ricevis bone vian karton, sed ni ne povas sendi al vi trian libron, ĉar laŭ nia interkonsento membroj tra BEA ricevas por sia pagita kotizo nur la kvin novajn librojn. Bonvolu atenti, ke vi pagis laŭ tia prospekto.

*S-ano Mócsi, Rumanujo.* Pro la ŝanĝo de la 2-a kaj 4-a libroj, vi nun ne ricevas libron. Tuj post kiam vi pagas la sekvan parton, ni sendos al vi ETERNA BUKEDO-n kaj la kvara parto jam estas pagita.

*At la membroj, jam ricevintaj duan kaj trian librojn* ni sendas la bibliografian gazeton aparte.

*H. Seppik, Oslo* Kompreneble ni akceptas novajn membrojn ankaŭ nun ĝis la 1-a de novembro. Kotizo

plialtiĝis al 17.— frankoj, aliaj sumoj restis senŝanĝaj.

*Niaj hispanaj membroj* rajtas al ni pagi por ĉio per internaciaj poŝtaj respondkuponoj, kiujn ni akceptas en la valoro de 0.30 svisaj frankoj. Nialkalkule tiu maniero estas por ili la plej profitiga por pagi kion ajn al eksterlando. Se ili ne povas tion apliki, bonvole sendu poŝtmandatojn al Postscheckamt Berlin NW. Konto nr. 138084, Wilhelm Bleier.

*Niaj japanaj abonantoj* bonvolu atente legi la kondiĉojn kaj konsilojn por hispanaj membroj, ĉar ankaŭ por ili validas la samaj.

*Niaj ĉinaj membroj* same bonvolu legi la hispanan informon.

**N**  
**NE FORGESU:**



**Limdato de baloto:**  
**15-a de julio**  
POR EKSTEREUROPANOJ  
**1-a de aŭgusto**



## NE MALĜPARU

sendante monon por menditaj  
libroj, gazetoj U Z U la subajn  
kontojn de

### Pocztowa Kasa Oszczednosci, Warszawa

surskribante NEPRE sur ĉiun en-  
pagilon la tekston: Na konto  
Administracja Literatura Mondo  
Krakow Numero 403,148

Aŭstrio: WIEN	---	No 79.50
Belgujo: BRUXELLES	---	No 244.209
Ĉeĥoslovakio: PRAHA	---	No 89.600
Danujo: KJÖBENHAVN	---	No 14.972
Francujo: PARIS	---	No 600.12
Nederlando: s' GRAVEN- HAGE	---	No 145.510
Jugoslavujo: BEOGRAD	---	No 65 049
Latvujo: RIGA	---	No 4.030
Svislando: BERN	---	No III.6.500
Svedujo: STOCKHOLM	---	No 4.312
Italujo: ROMA	---	No 1/10110

En aliaj landoj:

Germanujo: Wilhelm Bleier, BERLIN	---	No 138.084
Hungarujo: Bleier Vil- mos, BUDAPEST	---	No 25.168
Polujo: Administracja Li- teratura Mondo, Krakow	---	No 403.148

(Poŝtĉekkonto-posedantoj sendu ĝirojn  
nur al nia pola poŝtĉekkonto en Kra-  
kóv.) — El la landoj, ne menciitaj  
supre oni sendu poŝtmandatojn al

Postscheckamt Berlin,

Konto nr. Wilhelm Bleier 138.084

Ĉiuspecajn pagojn akceptas ankaŭ niaj  
reprezentantoj kaj la esperantistaj  
librovendistoj.

## Tutan bibliotekon

el  
11.000

diversaj malnovaj kaj novaj  
gazetoj esperantaj, inter ili multaj  
plenaj jarkolektoj de jam nehav-  
eblaj kaj malaperintaj

Kelkcent

uzitaj libroj, gvidlibroj, prospektoj

ĵus venis en nian posedon. Ni vendas  
la gazetojn popece, aŭ po jar-  
kolektoj, la librojn uzitajn por tre  
favora prezo.

Petu grandan kaj detalan liston  
kiun ni sendas al vi prunte  
post ricevo de 1 respondkupono.

Ni vendas ĉion

al la plejmulte oferanto kaj  
rezervas nenion speciale por iu ajn.



Du ekzemplerojn de

## LITERATURA MONDO

por unu respondkupono

ni liveras al ĉiu abonanto kaj AELA  
ano varbcele, el diversaj numeroj  
de 1931 kaj 1932.



Plej taŭga

materiale por ekspozicioj,  
por propagando.



Mendante

pli ol dek ekzemplerojn,  
ni donas 20% malplikoste.



# Balotilo

por la eldonaĵoj de Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj en 1934.

## Mi deziras, ke estu eldonataj

	Kalkulenda paĝonombro
1. Ĉeĥoslovaka Antologio .. .. .	650
2. Franz Werfel: Abiturienta renkontiĝo .. .. .	220
3. Stefan Zweig: Āmok .. .. .	88
4. Andrée Gide: Pastoral .. .. .	88
5. Sinclair Louis: Dr. Arrowsmith .. .. .	900
6. Aŭgust Gailit: Toomas Nippernaadi .. .. .	500
7. Jeluŝiĉ: Cezar .. .. .	500
8. Ĵun-Iĉiroo Tanizaki: Printempo furiozas .. .. .	140
9. Francisko Kõrmendi: Budapesta Aventuro .. .. .	600
10. Antoni Slominski: Mia vojaĝo en Sovetio .. .. .	160
11. Leo Belmont: La homo, pri kiu la mondo ridas .. .. .	250
12. Leo Belmont: Messalina .. .. .	800
13. Antal Hekler: Arthistorio I. .. .. .	320
14. Antal Hekler: Arthistorio II. .. .. .	270
15. Stellan Engholm romano .. .. .	125
16. Izrael Lejzerovicz: El la verda Biblio .. .. .	140
17. Skizoj de J. Ŝapiro, kun karikaturoj .. .. .	100
18. Francisko Szilágyi romano .. .. .	200
19. H. Weinhengst romano .. .. .	200

Balotinto: Nomo .....

Lando ..... Urbo .....

La verkojn elektitajn bonvolu **s u b s t r e k i**.  
Krom viaj nomo kaj loĝejo skribu nenion sur la balotilon.



## **SCIINDAĴOJ PRI LA BALOTILO**

*por la libroj de Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj en 1934-a jaro.*

1) Rajtas baloti ĉiu membro, kiu pagis la ĉijaran aŭ venont-jaran kotizon ĝis la 1-a de julio plej malfrue.

2) La balotfolioj devas alveni el Eŭropo kaj Nord-Ameriko plej malfrue ĝis 15-a de julio 1933. el aliaj landoj ĝis 1-a de aŭgusto 1933. Pli malfrue alvenontajn balotfoliojn ni devos flankenmeti sen konsidero.

3) Ĉiu membro rajtas indiki librojn laŭ la dorsflanka kalkulo de paĝonombro ĝis 2000—2200 paĝoj.

4) Se nenio kroma estas surskribata aŭ kunsendata kun la balotfolio, ĝi estas enmetebla en simplan koverton kaj sendebla al ni kiel presajo. Se oni sendas presajon, la koverto ne estas gluebla! Balotfoliojn alvenantajn al ni kun punmarko, ni rifuzos.

5) Se iu ne volas eltranĉi ĉi tiun parton el sia gazeto, rajtas sendi ankaŭ simplan karton kun la listo de la libroj elektitaj.

*Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj*  
(Literatura Mondo)

Hungarujo, Budapest, IX., Mester ucca 53, V. 7

